

	<h1>PENSEO</h1>	<i>N-ro 172</i> <i>Feb./2006</i>
	Monata Beletro Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994	
Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm		

Nokta Sakrado

En frida nokto senlune malhela, horloĝo zorge disbatas la dudek trian. Ĉar la enirkrado estas ŝlosita, ni devas surgrimpi la ĉirkaŭmuron por penetri. Tuj kiam ni rajdas la muron, jen forsaltas miaŭanta kato, kiun subite persekutas blekanta hundo. Ilin ni apenaŭ povas distingi en la mallumo.

Jam denove ekregas silento.

Ni saltas, sed strange la grundo ne rezistas sub nia pezo. Tial Brigita misekvilibriĝas, implikate per sia ampleksa pelerino, kaj falas teren. Spite ĉion, la falbruon dampas ŝiaj sakraĵoj.

Ekŝaltinte la poŝlampon, mi trovas ŝin kuŝanta sur ter-amaseto freŝe malkompakta; videble la grundon oni ŝpatis ĉitage. Jen kial ni tiom enprofundiĝis saltofine!

Balaante la grundon per la lumfasko, ni aŭguras la vesperon fruktodona: Hodiaŭ abundas floroj. Ties akran buntecon rivelas la lumfaska traserĉado.

Rapidegas la rikolto, kiun ni prognozas eĉ pli « florodona » ol kutime.

Dumrevene, la transgrimpado de la muro montriĝas pli riska, ĉar la rikolton ni nepre ne difektu.

Sed dank'al nia sperto, ni elturniĝas sendamaĝe.

Tuj transe, ni ekpaŝas al la stacidoma hotelgastejo. Ĉimomente la servo kvazaŭ finiĝas. Nur paro da malfruantoj prokrastas la fermadon.

Bridante sian malpaciencon, la hotelestro, apogiĝante ĉe sia kaso, atendas ilian foriron.

Tiu dikuleto, kun insida mieno, estas nia plej fidela kliento. Li akceptas nin falsaride, antaŭĝojante, ke morgaŭ liaj tabloj estos abunde florumitaj, despli pro la malalta prezo. La montirkesto aŭdigas akutan tintadon.

Floro iĝas oro.

Ekkaptante niajn brakplenojn da floroj, la ulo etendas al ni kvindekfrankan bankbileton.

« Dankon, sinjoro, kaj bonan vesperon! Ĝis baldaŭ! »

Apenaŭ ekpaŝas ni sur la trotuaro, kiam eĥas voĉo en la nokto:

« Fraŭlinoj! Fraŭlinoj! »

Spirmanke li atingas nin, floron enmane.

« Kial tiaj floroj troviĝas en la sortimento? »

Mi tuj rebatis:

« Tio ne gravas! Mia amikino ŝatas memfaradon. Ŝi trejniĝas en fabrikado de artefaritaj floroj. Ĉi tiun ni enmetis provocele... »

« Bone! Sed, mi petas, evitu intermiksi ilin. Tiajn mi ne tro ŝatas vidi surtable. »

« Ne plu timu! Ni atentis pri tio! Bonan vesperon! »

Li paŝas for kaj malaperas nokten.

Jen grava mispaŝo nia!

Adiaŭ tombejo florodona!

Ĉu pri la floroj, kiuj ornamas lian restoracion, li suspektis la devenon?

Neniam ni ekscios. Sed dank'al lia mono, ni sukcesis tamen havi ion por manĝi dum kelkaj monatoj.



Laŭ Béatrice Jouault (Raneto)
Kunesperantigita de la tradukgrupo en Pluezek

somere 2005

Du Almozuloj

S-ro Vilson estis legenda figuro en komerca rondo. Je la aĝo de kvardek jaroj, li estis sengroŝa, sed en malpli ol tri jaroj li fariĝis miliardulo. Kvankam saĝa kaj kapabla, li tamen kondukis strange. Ĉio, kion li faris laŭ siaj bontrovo kaj originala elpenso, troviĝis ĉiam ekster oniaj atendo kaj kompreno. Ĵurnaloj aperigis liajn amuzajn novaĵojn preskaŭ ĉiutage.

Tiutage, li sentis grandan ĝojon, ĉar li ĵus sukcesis subskribi mendilon je la valoro de cent miliono da usonaj dolaroj. Lia ĝojego kondukis lin al stranga ideo. Meze en la celebrado pri la sukcesa negocado, li ŝtele evitis sin de siaj sekvantoj kaj sola iris sencele surstrate. Subite li trovis almozulon staranta sub arbo kaj almozpeti de pasantoj per mantenata difektita ĉapelo senkoloriĝinta.

S-ro Vilson tuj naskis strangan ideon: se oni havigos al la almozulo milionon da dolaroj, kia li fariĝos? Tiu kuraĝa kaj stimula ideo faligis lin en grandan ekscitiĝon. Li tuj elpoŝigis oran karton valorantan je miliono da dolaroj kaj, surskribinte la kodnumeron, ĵetis ĝin en lian difektitan ĉapelon. Post tio, li foriris kvazaŭ nenio estus okazinta.

Ĉirkaŭirinte la stratangulon, s-ro Vilson ankoraŭ droniĝis en ĝoja orgasmo pro sia kreado de milionulo en palpebruma tempo. Subite li preskaŭ stumbles de io sur la tero. Turninte sian kapon, li vidis dekunu-aŭ-dekdu-jaran almozuleton sidanta ĉe leterkesto, kun malbonodoraj kruroj etenditaj delonge, kiuj preskaŭ faligis lin. Sur lia maldekstre vango cikatro kuris oblikve de la

frunto ĝis la mentono, impresante terure. S-ro Vilson tuj sentis senliman kompaton kaj decidis doni al li helpon. Tamen li forgesis, ke li neniam kunportas konstantan monon kun si. Traserĉinte ĉiujn poŝojn, li trovis nur unu moneron de dolaro. Sinĝene li diris, “Pardonon! Mi havas nur tiun moneron. Se vi volas, venu al mi je ajna tempo!” Dirante, li ĵetis sian nomkarton kaj tiun moneron en la difektitan bovlon de la almozuleto.

Dudek jaroj flugis. Iun tagon, junulo nomita Henriko sin turnis al la oficejo de s-ro Vilson, insistante, ke li interparolos pri negocado nur kun tiu mem, kaj ke li forlasos la negocado, se tiu ne venos persone. Tiam s-ro Vilson jam transdonis ĉiujn komercajn aferojn al sia filo por administri, kaj krom se grava afero bezonis lian zorgon, li ne estis aperonta ĉe negocado. La nefaman vizitanton, kiel Henrikon, li ne devus persone akcepti, sed ties stranga konduto venis ĝuste en akordo kun lia plaĉo. Li decidis intervidiĝi persone kun tiu neatendita vizitanto.

Malaltstatura, Henriko surportis simplan kaj senĝenan vestaĵon. Tre okulfrapa montriĝis la cikatro oblikve kuranta sur lia vango, la cikatro, kiu donis al s-ro Vilson impreson de konateco. Ekster lia atendo, Henriko kunportis profitdonan negocon je valoro de pli ol cent milionoj da dolaroj, kaj s-ro Vilson komencis koncentri sian atenton sur la negoco, antaŭ ol pripensi en detaloj.



Oni ne atendis, ke la intertraktado iris glate. La kondiĉoj, kiujn s-ro Vilson elmetis, estis akceptataj preskaŭ sen marĉandado. Kvankam

mense preta, s-ro Vilson ŝtoniĝis kaj aŭtomate ekis ekzameni Henrikon denove.

Tiam Henriko ekparolis, ridetante, “Estimata s-ro Vilson, ĉu vi ankoraŭ rememoras pri la amozuleto, kiun vi helpis dudek jarojn antaŭe? Mi atendas dudek jarojn. Hodiaŭ mi speciale venas por esprimi al vi mian respekton, kaj redonas ion al vi.” Dirante, li eligis aĵon el sia interna poŝo kaj rrespektplene ĝin prezentis al s-ro Vilson. Ĵetinte ekrigardon al ĝi, li trovis, ke ĝi estas unu el speco de nomkartoj, kiun li uzis antaŭ dudek jaroj, kaj ke pro longa tempo ĝi jam estas flaviĝinta. Henriko daŭrigis, “Mi pensas, ke probable mi estas la unua kaj ununura amozuleto, kiu ricevis nomkarton dum amozpetado. Mi vere estas bonsorta! Dum dudek jaroj, mi ĉiam admonis al mi mem, ke mi ne devu vaniigi la bonŝancon. Jen mi realigas mian deziron!”

Ĝuste nun ĉio spertita revenis en la memoron de s-ro Vilson. Kun granda ĝojo, li alkuris, brakumis Henrikon kaj turnadis ronde kiel infano. Ŝajnis, ke li sentas multe pli da ĝojo ol ili sukcesis en negocado. Subite li kvazaŭe ekpensis pri io urĝa, kaj lasinte Henrikon, hastis for eĉ sen diri unu vorton. Henriko ŝultrotiris, montrante neniom da surprizo.



S-ro Vilson iris al la loko, kie li fordonis milionon da dolaroj. Kun forpaso de tempo, la strato ne aspektis homplena kaj prospera kiel antaŭe, kaj la folioj de tiu arbo pendis dense kiel baldakeno. Li surprise trovis, ke sub la arbo staras eĉ la almozulo kun difektita ĉapelo en manoj por peti de pasantoj. Jen la sama sceno kiel antaŭ dudek jaroj! Retenante sian

ekscitiĝon, s-ro Vilson alpaŝis al la almozulo. “Ĉu vi ĉiam amozpetas ĉi tie, s-ro?” “Jes.” La almozulo eĉ ne movetis sian palpebron. “Kial vi ne ŝanĝas ĉi tiun lokon por alia homplena loko?” “Kial ŝanĝi? Ĉi tie estas mia benita loko! Iu donis al mi eĉ milionon da dolaroj!” Radiis liaj okuloj, kiam li parolis, kvazaŭ li fanfaronus pri sia pasinta gloro. S-ro Vilson sentis subitan perdiĝon kaj, sin turninte, foriris silente.

el:www.wxwx.cn

elĉiniegis **Soneto**

El Libro de Poezio

Digo de Ru-rivero

**edzino konsolas sian edzon kiu funkcias sur la posteno de malalta rango en la Okcidenta Zhou-dinastio (1066 a.K. – 771 a.K.), kaj rifuĝas hejmen pro la dinastia terura diktaturo.*

Mi laŭ digo paŝas vage,
Kaj kolektas branĉojn hake.
L’ edzon longe mi ne vidas,
Kvazaŭ en malsat’ insidas.
Mi laŭ digo paŝas vage,
Kaj kolektas vergojn hake.
Nun la edzon mi jam vidas,
Li fidele ne forglitas.
Ruĝas pate vost’ de bramo,
Reg-teruro ŝajnas flamo.
Ni, spite ke flamas rego,
Lasu l’ gepatrojn en flego.

1) Ru – nomo de rivero en la nuna prov. Henan.

Nobla Cilino

**psalmo al nobela familio per metaforo de cilino. 1)*

Cilin’ ne batas hufe homon,
Princaj filoj honestas,
Ho, gankas noblan la renommon!

